EKO 2022 Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 68 > ● Z-tagaj festoj ● Paske kaj pli ● ILEI ● Greziljono < decembro 4**

# Zam-festoj 2022 – speciala kompilo

## Zamenhoftaga festado de TEJO

Ĉiu festas ĝin siamaniere, bonŝance. TEJO organizas filmeton kun salutoj plurlandaj:

https://www.tejo.org/fr/partoprenu-en-filmeto-de-tejo-por-la-zamenhofa-tago-2022/

Dum pliiĝas la afiŝetoj en https://espereto.com/informiloj/ . Kontrolu ĉu ĝi jam ekzistas en via lingvo [mi aldonas la suahilan uzatan en Afriko].

Renato Corsetti

## Francaj fervojistoj festas frue

Post la tre sukcesa virtuala kongreso ni laŭgrade revenas al la reala mondo, kie ni trovas esperantistojn, kiuj diversmaniere pretigas sin por la Zamenhof-tago, ĉirkaŭ la 15-a de decembro.

Jen ekzemplo el Francio (afiŝo de la PDF).

La fervojistoj organizas Zamenhofan feston la 17-an de decembro, 19 rue Traversière Paris 12ème

De: LAFARGUE Sylviane <sylviane.lafargue@...>

Sylviane Lafargue, Prezidanto de AFCE (la francaj fervojistoj)

## La franca sidejo de FE kursumis

En la 6a de decembro okazis unuhora fulmkurso por malkovri la lingvon. Senpaga evento. Por homoj, kiuj neniam lernis Esperanton. Okazis en nia sidejo: 4bis rue de la Cerisaie 75004 Paris, metroo Bastille. Vizitu nian retejon

https://esperanto.paris/?lang=eo

https://esperanto.paris/?lang=fr

## Kroatio pretigas sin por Z

De: "KEL" <kel@...>

Spomenka Stimec

## Zamenhofaj festoj tutmonde

Baldaŭ okazos en la tuta mondo diversaj eventoj, renkontiĝoj kaj festoj lige kun la Zamenhof-tago, la 15-a de decembro. Por montri la viglecon de tiuj okazoj, la retejo Eventa Servo ekdisponigis specialan paĝon: https://zamenhof.eventaservo.org. Ĝi ligas

al la serĉilo de Eventa Servo, ĉe kiu jam aperas pli ol 30 rilataj eventoj!

La paĝo estas rezulto de kunlaboro inter Yves Nevelsteen, komisiito de UEA pri reta agado kaj kunordiganto de la Fonduso Instigo, Fernando Ŝajani, kreinto de Eventa Servo, kaj Lode Van de Velde, eldonisto (Eldonejo Libera).

UEA invitas la Esperanto-komunumon kapti la okazon aldoni al la listo ankaŭ sian eventon aŭ feston ĉirkaŭ la Zamenhof-tago. Ĉu mankas via festo? Aldonu ĝin! Instrukcian filmeton kiel registriĝi oni vidu ĉe: https://mallonge.net/es1. Se restas dubo

aŭ se vi spertas praktikan malfacilaĵon, ne hezitu sendi retmesaĝon al kontakto@....

Ĉu vi ne bone scias, kio estas Eventa Servo kaj kial uzi ĝin por diskonigi viajn eventojn? Legu kaj spektu:

· Ĉu viaj eventoj estas diskonigindaj? Artikolo, kiu aperis en la februara numero de 2020 de la revuo Esperanto;

· Eventa Servo: evoluoj kaj planoj: Artikolo, kiu aperis en la oktobra numero de 2022 de la revuo Esperanto;

· Prezento pri Eventa Servo kun trejnado dum la 3-a Virtuala Kongreso (spektebla ĝis la 31-a de decembro 2022).

Se vi ne aliĝis al la 3-a Virtuala Kongreso, vi ankoraŭ povas tion fari por ĝui ĝian enhavon: http://vk.esperanto.net. Por konstante legi la enhavon de la revuo Esperanto,

aliĝu al UEA: https://uea.org/alighoj/alighilo (aliĝoj kiel MA aŭ DMA estas aparte

bonvenaj). La retejon Eventa Servo kaj aliaj retaj agadoj vi subtenas per donacoj al la Fonduso Instigo, sub la aŭspicioj de UEA: https://instigo.be.

Al ĉiuj UEA deziras belajn festojn!

## Ondo da informoj pri la jarfinaj festoj

Decembro estas la plej festa monato por esperantistoj pro la naskiĝdatreveno de Zamenhof = Tago de la Esperanta Libro kaj gajaj novjarfestaj renkontiĝoj. Sed en decembro estas ankaŭ memordatoj de Ivo Lapenna, Teo Jung, Đào Anh Kha, Ferenc Szilágyi, Francisko Valdomiro Lorenz kaj aliaj esperantistaj eminentuloj. Legu en “La Ondo de Esperanto” la decembran liston de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj, kiun dum pluraj jaroj ĉiumonate kompilas Aleksander Korĵenkov (Kaliningrado, Ruslando): https://sezonoj.ru/2022/12/decembro-10/

Ni estas kontraŭ milito, ni estas por paco!, La retejo por vi: https://sezonoj.ru/

## Antaŭrigarde al Pasko – Germanio invitas!

Temas pri la Printempa Semajno Internacia (PSI), renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio, kiu ĉiu-jare okazas dum Pasko (psi.esperanto.de). Post la pandemio ni (psi.esperanto.de/teamo) volas reaktivigi ĝin kaj samtempe pli internaciigi kaj iomete junigi ĝin. Pro tio ni petas vin sendi la suban tekston kaj la alkroĉitajn dosierojn baldaŭ al la membroj de via komunumo. Ni petas vin meti nian adreson (psi@...) je Bcc:, kiam vi sendas la mesaĝon al viaj membroj aŭ al aliaj.

Stefan Krieghoff kaj Ralf Haumer
nome de la PSI-organiza teamo de la Germana Esperanto Asocio

# Antaŭrigardo – bona kotiza periodo

# La 56a KONGRESO de ILEI

Tempo: Ekde la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2023

Loko: Linjano Orsabla (Itale: Lignano Sabbiadoro), Italio

Ĉef-temo de la Kongreso: "Instrui Esperanton en lernejoj"

Retejo de la Kongreso: https://2023.kongreso.org/

Post tri sinsekvaj nur-virtualaj Kongresoj, en 2023 la 56-a Kongreso de ILEI denove okazos ankaŭ en ĉeesta medio en la belega urbo Lignano Sabbiadoro en Italio, en la strandurbo Linjano Orsabla (itale: Lignano Sabbiadoro) situanta mezvoje inter Venecio kaj Triesto, en ampleksa Kongresejo, kiu ebligos al ĉiuj kongresanoj loĝi, manĝi, labori, kaj ankaŭ ferii en la sama feria vilaĝo. La kongresejo disponas, kaj senpage disponigas al la kongresanoj, privatan plaĝon, akvoparkon, olimpikan naĝejon, plurajn altrangajn ekipitajn sportajn spacojn ĉu kovritajn ĉu malfermajn.

La ĉefa temo de la Kongreso estos: "Instrui Esperanton en lernejoj". La kongresa ĉeftemo certe vekos la intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de profesiuloj pri instruado de aliaj lingvoj, universitataj esploristoj kaj profesoroj, ĵurnalistoj kaj ĝenerala publiko; unuvorte ĉiuj, kiuj iel dediĉas sin al la temo, ĉu profesie, ĉu ne.

Ni atendas vian aliĝon kaj viajn kontribuaĵojn ĉu pri la kongresa temo, ĉu pri aliaj pedagogiaj temoj, ĉu por la Lingva Festivalo, aŭ por la Internacia Vespero, ktp. Vi povas indiki pri viaj ofertoj kaj kontribuaĵoj kaj en la aliĝilo kaj per retmesaĝo al: ilei.kongresoj@....

La limdato por sendo de la proponataj kontribuaĵoj estas la 31-a de januaro 2023, por ke ili certe estu aldonitaj al la provizora programo de la Kongreso. Por ĉiu via kontribuaĵo, ĉu prelego aŭ alia, bonvolu sendi al ni (ilei.kongresoj@...):

- titolon de la kontribuaĵo
- vian kompletan nomon
- daŭron de la prezentado
- ĉu vi prezentos ĉeeste aŭ rete
- du- ĝis maksimume kvin-linian priskribon de la kontribuaĵo
- du- ĝis maksimume kvin-linian biografion de vi
- vian foton

Kiel kutime, vi povos ĝui ankaŭ ekskursojn, Lingvan Festivalon, spektaklojn, ktp.

Vi trovos ĉiujn detalojn pri aliĝo en la kongresa retejo: "2023.kongreso.org."

BONVOLU MEMORI, KE LA MALPLEJ KOSTA ALIĜKOTIZO VALIDAS ĜIS LA 31-A DE DECEMBRO 2022. DO BONVOLU TUJ ALIĜI POR NE ATENDI LA DUAN PERIODON DE LA KOTIZO.

Laura Brazzabeni, ILEI-Estrarano pri kongresoj

# Printempa Greziljono

Ø Jen fotoj: Staĝo Printempas: Mireille (33)

Ø 70-jariĝo: Xavier (51)

Ø Infana semajno : Xavier Godivier (91)

Ø staĝo Aŭtunas: Xavier Godivier (63)

Vi povus iĝi unu el ĉ. 250 societanoj kaj tiel posedi "brikon" de la kastelo. Legu en gresillon.org/societano

Kore salutas vin Kulturdomo
M.C.E - Maison Culturelle de l'Espéranto
1310 route du Lude, Grésillon – Saint Martin d'Arcé– 49150 Baugé en Anjou – France
Téléphone : 02 41 89 10 34 (répondeur)
Rete: : kastelo@...

========= vortoj: 1050 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe:
<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe:
http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo

2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

Stefan MacGill
Respondecoj UEA: Landa Agado, AMO,-seminarioj,
Respondecoj ILEI: EKO-komunikoj kaj informoj pri Sekcioj

Atingoj etaj, sed konkretaj